TKKE informas

N-ro 3 Aprilo 1956 Aperas laŭbezone

KONFERENCO DE POPOLDEMOKRATIAJ ESPERAPTISTOJ

ne okazos nunjare en Bratislava, sed en V a r s o v i o. Ĉar ni ne atingis aprobon de la konferenco fare de la ministerio por kulturo kaj la tempo urĝas, ni efektive borvenigis la leteron de la Asocio de Esperantistoj eh Pollando, en kiu AEP proponas la konferencon 1956 en Varsovio. Polaj arnikoj, infornas nin, ke 1a proponon entuziasme akceptis la esperantistoj en Sovetunio, Germana Demokrata Respubliko, Bulgario kaj Hungario. Same entuziasme ni ĝin akceptas. Tuj post la ekscio de precizaj detaloj ni traktos kun nia vojaĝentrepreno pri komuna vizito de Varsovio.

Celostátní esperantský poradní sbor dne 7. 3. 1956 zaslal Československé akademii věd (kabinetu pro moderní filologii, katedře dialektického a historického materialismu a katedře jazyků) dopisy se žádostí o sdělení stanoviska l) zda mohou existovat námitky proti používání mezinárodního jazyka jako pomocného dorozumívacího prostředku z hlediska filosofického, filologického a společenského, 2) zda otázka mezinárodního jazyka je považována za důležitou a prospěšnou.

Všechny tři složky ČSAV na tyto otázky odpověděly obsáhlými přípisy k l a d n ě . Tyto dokumentární dopisy budou sloužiti jako podklad k dalšímu jednání s úředními místy o normalizaci esperantského hnutí v ČSR, protože kladný názor naší nejvyšší vědecké instituce je pro naši další práci velmi důležitý.

LABORKUNVENO DE LA REGIONOJ OSTRAVA-OLOMOUC okazis la 11-an de marto en Karviná. Partoprenis gesamideanoj el 14 lokoj . S-ano J. Vítek alsendis informan leteron pri la nuna stato de la movado, s-ano D-ro V. Mohapl donas bildon pri Olomouc, kie kreskas la anaro, kaj proponas la tutŝtatan konferencon en Ostrava, sed la ĉeestantoj proponas Olomouc kiel la plej taŭga loko. S-ano Kočvara raportas pri la "Tagigo" kaj instigas al pli multnombra abono, kaj pri la laboro de la Junularo Ostrava. S-ano Raška pri Klimkovice (pionira domo) kaj siaj traktadoj kun la lerneja inspektoro en Ostrava, s-anino Bartovská el Místek legas leteron de s-ano D-ro Černý el Hradec Král. kaj s-ano Glajcar el Polujo, s-ano Schwetter el Havířov pri kurso en sia lernejo kaj pri sia demando al la redakcio de Mladá fronta "Kio estas Esperanto?", s-ano Novosad el Kopřivnice tralegas tre efikan artikolon el la uzina gazeto "Tatrovák", s-ano Michna el Lichkov informas pri sia loko kaj akcentas bezonon de lernolibroj, s-anino Milatová, kiu protokolas, donas bildon pri Třinec, s-ano Odehnal, kiu meritas dankon pro la organiuo de la konferenco, pri Karviná, kie li gvidas kurson. S-ano V. Slaný, regiona peranto en sia referato menciis la pasintajn laborkunvenojn kaj prezentis planon de la venontaj: en majo en Jeseník, en junio en Třinec samtempe kun la seminario, kiu finos la 10-an de junio per la laborkunveno sur monto Ĉantoryja, en julio en Příbor, en septembro en Místek. Per komuna kanto de „La Espero“ estis la kunveno en Karviná finita.